

# Pola Esperantisto Esperantysta Polski

XXXIII JARO

NRO 5-6

MAJO-JUNIO 1939

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTO — REDAKTOR

PROF. DR ODON BUJWID

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

## GDAŃSK — DANZIG.

Legendoj rakontas, ke Danzig estis fondita de Wyzimir, nepo de Lech, prapatro de Lechidoj-Poloj. Depost la tempoj de la reĝo Boleslaw la Granda Danzig kune kun Apudmara Lando (Pomeranio), kiu tiam enhavis ankaŭ Stettin kaj la insulon Rugja, apartenis al Polujo. Johano Kosmas de Praha, en la jaro 1.000 nomas „Gyddanize“ pola lim-urbo. Poste regis tiun landon vojevodoj, kies estreco ŝanĝiĝis je princa, pli aŭ malpli dependa de la polaj reĝoj. Princo Świętopelk venigis en j. 1227 al Danzig la monanojn Dominikanojn kaj iniciatis la ĝis nun ekzistantajn foirojn en la tago de S-ta Dominiko. Post la morto de la lasta princo Mestwin II ekregis tie la reĝo Przemyslaw kaj post li Wladyslaw Łokietek. Estante okupita en aliaj partoj de la lando, li venigis la Kruckavalirojn kontraŭ Waldemar II de Brandenburgio, kiu minacis al Danzig. Sili okupis Danzig kaj Pomeranion. La urbon ili ekposedis per ruzo kaj faris en ĝi teruran buĉadon, kies rememoro vivas ankoraŭ ĝis nun en la popolaj kantoj de Kaŝuboj. Sub la regado de Krucistoj Danzig prosperis dum la majstro Winrich de Kniprode, tamen baldaŭ komenciĝis periodo de subpremado kaj limigado de libereco, pri kiuj rakontas senpartiaj germanaj fontoj. La grandmajstro Konrad Wallenrod fondis eĉ en j. 1390 apar-

tan Novan Urbon kaj donis al ĝi privilegiojn por subfosi la signifon de Danzig. La plej nuba periodo de regado de Kruckavaliroj ekestis post la batalo apud Grunwald (Tannenberg) en j. 1410. La komturo Ulrich von Plauen antaŭ Pasko inside ordonis murdi en la Danziga kastelo la urbestrojn Konradon von Letzkau kaj Arnoldon Hecht kaj la konsilanon B. Gross kaj iliajn korpojn ĵeti en sterkon. Oni entombigis ilin poste en la Maria preĝejo. Danzig aliĝis poste al la insurekcio kontraŭ la Kruckavaliroj kaj en j. 1454 konkiris kaj detruis ilian kastelon senpostesigne. Dum la tuta milito por aligo de Pomeranio al Polujo la plej grandajn oferojn portis Danzig, sed esti vere reĝe donacita de Kazimiro Jagellono en „Privilegium Casimirianum“, kiu donis al ĝi la plej grandajn avantaĝojn, kiajn oni nur povis imagi. Dum la regado de Kruckavaliroj Toruń, kuŝanta ĉe la tiama pola limo disvolviĝis kaj riĉiĝis danke al tio, ke ĝi estis komerca ĉefpunkto inter Polujo kaj Okcidento; post la reveno de Pomeranio al Polujo ĝian lokon ekposedis Danzig. El profundo de Polujo sur Vistulo, kiu kune kun siaj flankriveroj trafluas la tutan landon, oni venigadis al Danzig grenon, lignon por la konstruado de la ŝipoj, linon, kanabon k. t. p.; intersanĝe Danzig liveris al la lando produktojn de artindustrio, kiuj

tiam estis modaj tiel, ke hodiaŭ la plej grandiozajn artobjektojn oni devas serĉi ne en Danzig, sed en Polujo.

Dum kelkjarcenta regado pola nur unufoje la urbo kontraŭstaris la reĝon, nome kontraŭ Stefan Batory, timante limigon de l' privilegioj, tamen baldaŭ ĝiaj reprezentantoj surgenue petis la pardonon de l' reĝo. Ekzemplojn de neŝancelebla kaj senlime oferema fideleco por Polujo donis Danzig dum la svedaj militoj, kio elvokas tiom pli grandan admiron, ke plimulto da Danziganoj estis evangelianoj kaj la Svedoj proklamis, ke ili batalas en la nomo de tiu konfeso. Rimarkinda estas la fideleco de Danzig al la reĝo Stanislaw Leszczyński kontraŭulo de Aŭgust la Saksa, kiu kaŭzis al la urbo sennombrajn perdojn. La tempoj de disdivido de Polujo estis por Danzig ankaŭ malĝojaj. Detranĉita dum la unua divido de Polujo en j. 1773 pro okupo de Pomeranio fare de Prusujo Danzig restis fidela al Polujo, malgraŭ la fera ringo de prusa impostlimo, kaj falis nur pro tio, ke ĝi ne volis propravole submetiĝi. Pri la agordo, kiu tiam regis en la malfeliĉa urbo, bone atestas la memoraĵoj de Johanna Schopenhauer, la patrino de l' granda filozofo, kiu kune kun la edzo forlasis Dancigon kelkajn horojn antaŭ la eniro de prusa militistaro, ne volante simile al multaj aliaj, vivi en la urbo, kiu perdis sian republikanan liberecon. Ankaŭ la fama artisto Daniel Chodowiecki, naskiĝinta en Danzig, kiu pro gajno transloĝiĝis Berlinon kaj en j. 1773 vojaĝis Dancigon por viziti la familion, atestas pri la sentoj de Danziganoj al Polujo. Post disigo de Polujo la urbo senigite de vivigaj fontoj falis en la vicon de triagradaj provincaj lokoj, kaj hodiaŭ Gdynia, kiu en la momento de ekposedo de la marbordo per Polujo estis vilaĝo kun dekelkaj dometoj, kreskas kun rapideco de amerikaj urboj, kio tute ne estas ŝatata de Danzig.

Ŝatante de antikvaj memoraĵoj trovas en Danzig multajn grandiozajn monumentojn de arto kaj arkitekturo. De la romanaj monumentoj restis nur partoj de internaĵoj en la preĝejo en Oliwa kaj de S-ta Nikolao en Danzig. La gota arkitekturo estas parto de brika konstrumaniĝo, kiu vidigas en la tuta Polujo kaj en tiuj partoj de hodiaŭa Germanujo, kiuj estis iam enloĝataj de Slavoj. Kiam la gota stilo povis tiel la internan kiel ankaŭ la eksteran flankon de konstruaj riĉe ornamita per skulptaĵoj, la brika gotstilo devis limiĝi al ornamado de la muroj per substrekado de konkavaĵoj kaj konvexaĵoj; tio estas la kaŭzo de multaj kavaĵoj, ornamentaj zonoj brikaj, vertikalaj ripoj k. t. p. En la tuta Pomeranio oni rimar-

kas la deziron doni al la muroj multkolorecon, kiun oni atingis kovrante la kavaĵojn per kalktavolo forte kontrastanta kun la fono de ruĝa briko. Belegaj ornamoj de diverskolore poluritaj brikoj, kiuj tiel riĉe estis enkondukita en la preĝejo de S-ta Jakobo en Toruń, estis nur parte aplikitaj.

Ekstreme ĉarma konstruado en Danzig estas la Granda Muelejo, konstruita en j. 1349 de la Kruckavaliroj, donacita al la urbo de Kazimierz Jagellono, tre interesa pro tio, ke ĝi ĝis nun funkcias movata kiel iam per la rivereto Radunia. Grandioza estas la Malliberula Turo konstruita en j. 1346 kiel fortikaĵo en la urbomuroj, ŝanĝita poste je malliberejo, kovrita per belega tegmento en la stilo de nederlanda renaskiĝo en j. 1587. Apud ĝi troviĝas la Ekzekutejo, rekonstruita en j. 1576 en la sama stilo, riĉe ornamita per skulptaĵoj, kaj la malfrugota Pafejo de S-ta Georgo el j. 1494. Proksime oni rimarkas ŝtonkonstruitan iaman pordegon nomatan Alta pro tio, ke ĝi kondukas al monteta ĉirkaŭaĵo, kiam la kontrasta pordego kondukanta al la apudvistula ebenaĵo, ricevis la nomon Malalta. La Altan pordegon konstruis en j. 1588 Wilhelm von dem Blocke laŭ la Berchem'a pordego en Antverpen, kiu prenis ekzemplon de la pordego de Veniza arkitekto Michele Sanmicheli, similaj al la romaj triumfaj arkoj. La malsupera parto de la danziga pordego ornamita per rustiko kun konkave skulptita branĉeto sur ĉiu ŝtono. Sur la supra frizo aperas grandiozaj blazonoj de Polujo, Pola Pomeranio kaj Danzig.

Trairinte la suprenomitaĵojn al la urbo, oni ekvidas la pordon de la Longa strato. Iam ĝi estis gota en la muroj, kiuj per malpli larĝa zono ĉirkaŭis la iaman urbon. Kiam ĝi perdis sian antaŭan signifon, oni anstataŭis ĝin en j. 1614 per alia, ĝis nun ekzistanta, pure ornama, en la stilo de malfrua itala renaskiĝo kun flandraj aliĝoj. De sub la arkaĵoj de tiu pordego montriĝas belega perspektivo al la Longa strato, iom kurbiganta, sur kies fino aperas ĉarma urbodomo kun malpeza, gracia tureto. Ankoraŭ hodiaŭ tiu strato konservis sufiĉe grandan nombron da malnovaj domoj. Iam, kiam antaŭ ĉiu domo etendiĝis terasoj similaj al tiuj, kiuj konserviĝis en la najbareco de Maria preĝejo, la perspektivo estis tiel ĉarma, kiel ĝin prezentas en siaj desegnaĵoj Chodowiecki. La urbodomon oni rekonstruis el gota kaj la turon kovris per belega kupra kiraso en la speco, kiun kreis la flandra renaskiĝo. En ĝia supra, simile al la preĝejo de S-ta Katarino aranĝita estas la sonorilmuziko. En la urbodomo la plej bela estas la ruĝa ĉambrego de

konsilioj, rememoriganta la plej ĉarmajn internajojn de italaj palacoj de malfrua renaskiĝo. Al tiu ĉambrego kondukas riĉe lignoskulptita pordo kun granda pola aglo surhavantanta la blazonon de la reĝo Johano Sobieski. En la ĉambrego iom kaŝite denove aperas la pola aglo ligneskulptita. En la najbara malpli granda ĉambro oni renkontas la aglon kun la blazono de Henriko Valois, reĝo de Polujo kaj Francujo (Henriko III), kaj en la tuta urbodomo estas multe da interesaj memorajoj el la polaj tempoj, ekz. la horloĝo donacita de la reĝo Stanislaw Leszczyński. Iam la grandan, t. n. blankan ĉabron ornamis la portretoj de la polaj reĝoj, de kiuj la plej bela estis tiu de Władysław IV., pentrita de la fama danziga majstro Daniel Schulz.

Malantaŭ la urbodomo ĉe la Longa Foi-rejo staras la Artuskorto, iama sidejo de societoj de riĉaj urbanoj, ŝanĝita en j. 1742 je grenborso. Sur la pordego troviĝas skulptitaj brustbildoj de la reĝoj Zygmunt III kaj Władysław IV. Nun oni eniras tien tra la najbara domo, kies vestiblon ornamis per dancigaj antikvaĵoj konata kolektanto Giełdziński. La interno de Artuskorto formas unu ĉambregon, apogitan je kvar granitaj kolonoj subtenantaj palmoforman arkadon. Ciu societo, kiu tie ekzistis, ornamis laŭ sia plaĉo sian lokon, kaj de tio formiĝis surpriza diverseco de mebloj. Oni vidas tie tre malnovan bildon prezentantan la konkiron de Malborg de Kazimiro Jagellono kune kun la dancigaj helpmilitistoj, bildon de Orfeus, verko de Johano Fredeman de Vries el Leeward, fama pro siaj eldonaĵoj de bildoj de nederlanda renaskiĝo, la bildon de la Lasta Juĝo de Anton Möller, nomata „la pentristo de Danzig“, marmoran statuon de la reĝo August III, portreton de Stanislaw August k. t. p. Intereson vekas malgrandaj modeloj de ŝipoj pendigitaj sub la plafono. Rimarkindaĵo estas forno alta je 12 m. de koloze poluritaj kaheloj devenanta el j. 1546.

Antaŭ la Artuskorto staras puto kun la bronza statuo de Neptuno, la verko de Adrian de Vries el j. 1620. Sur la ĉirkaŭanta ĝin fera krado devenanta el j. 1634 troviĝas polaj kaj danzigaj blazonoj.

La Longan Foi-rejon formas La verda pordego, kiu estis domo konstruita por la polaj reĝoj kaj samtempe pordo kondukanta al Mottlau la flankrivero de Vistulo, kiu formas en Danzig internan havenon. Konstruis ĝin Johano Kramer en j. 1564 en tipa stilo de nederlanda renaskiĝo kun certa aldonado de itala ornamarto. La sama Kramer konstruis en j. 1569 la Anglan domon, la plej grandan privatan domon en Danzig.

En la stilo de nederlanda renaskiĝo estas

la urbodomo de Malnova Urbo, la verko de Anton von Obbergen el j. 1589 interesa pro tio, ke simile al kelkaj nederlandaj domoj, la fenestroj de l' teretaĝo ne respondas al la fenestroj de la supra etaĝo, kion oni rimarkas ankaŭ en la Armilejo, ekstreme originala konstruaĵo de la sama majstro.

De la Verda Ponto sur Mottlau grandioze prezentigas la granda levilo havena konstruita en j. 1411, pro kiu komenciĝis la malpaco de la urbo kun la Kruckavaliroj, kiu alkondukis al la supremenciita krima mortigo de la urbestroj. Inter la brakoj de Mottlau kuŝas la Insulo de Grenejoj, sur kiu la pli malnovaj grenejoj memoras la polajn tempojn, kiam oni tie metis la grenon venigatan el la profundo de l' lando. La plej karakterizaj estas la Ansera Kolo de j. ĉ. 1400 kaj la „Reĝa grenejo“.

La privataj domoj en Danzig laŭ la norda kutimo havis larĝon de nur du aŭ tri fenestroj, sed alton de tri aŭ eĉ kvar etaĝoj, kun krutaj tegmentoj kaj altaj teretaĝoj, en kiuj troviĝis granda vestiblo. Tiuj mezepokajn dimensiojn konservis la domoj ankaŭ, kiam el Nederlando venis la stilo de renaskiĝo en la speco flandra aŭ itala-franca. La plej bela specimeno de malfrua itala renaskiĝo estas la domo konstruita en jaro 1618 de Johano Speyman la urbestro, kiu fariĝis fama per tio, ke dum malsato en Italujo sendis tien grandan ŝiparon kun la greno. De la posteaj posedantoj devenas la nomo de Domo de Steffens. Fama danziga skulptiisto Andreo Schlüter la Maljuna en la domo por si konstruita en j. 1640 kunigis motivojn nederlandajn kun italaj kaj kreis tuton, kiu fariĝis tipa por la stilo de la domoj en Danzig.

La plej grandioza preĝejo en Danzig estas de S-ta Maria, konstruita en j. 1402 – 1502, longa je 105 m., larĝa je 66 m., kun potenco, nefinita turo alta je 78 m. Same ĝia ekstero kiel ankaŭ la interno faras imponan impreson pro sia simpleco kaj potenco. Interne konserviĝis multe da valoraj antikvaĵoj, kiel la triptiko de la Lasta Juĝo, unu el la plej bonaj verkoj de Johano Memling, la triptiko skulptita en j. 1515 de Miĥaelo Schwarz de Augsburg, granda horloĝo astronomia, la verko de Johano Düringer el j. 1470 kaj la fama kolekto da liturgiaj vestoj, inter kiuj la plej malnovaj teksaĵoj devenas de la XII jc.

Malpli granda, sed ne malpli interesa estas la preĝejoj de S-ta Katarino, de S-ta Triunuo kun la kapelo de S-ta Anna, de S-ta Johano kun potenca turo, de S-ta Nikolao kun multaj polaj tomoŝtonoj kaj la lasta de la gotaj, tiu de S-taj Petro kaj Paŭlo.

La renaskiĝo postlasis neniam monumentojn en la preĝejoj konstruaj, ĉar tiam kun la reformacio malfortiĝis la fervoro al konstruado de novaj preĝejoj, kaj la baroko donis nur la Reĝan Kapelon, nomitan tiel je la honoro de Johano Sobieski, kiu kune kun la primato Olszowski subtenis ĝian kon-

struadon. Tiun kapelon ornamas la skulptaĵoj de Andreo Schlüter la pli juna.

El artindustrio en Danzig plej altan nivelon atingis la orajista, bronza kaj lignajista, kaj la monfarejo, gravur-kaj presarto famiĝis per vico da unuarangaj verkoj.

Belan muzeon de artaj antikvaĵoj posedas Danzig en la postfranciskana monaĥejo.

## EK AL LWÓW!

POR POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.

**S**emper fidelis — ĉiam fidela — jen la vortoj, kiuj estas enskribitaj sur la blazono de nia kara urbo, vortoj, kiuj plej precize pentras la internan animon de ĝiaj loĝantoj,

„semper fidelis“ ĝi estis dum tataraj kaj kozakaj invadoj antaŭ jarcentoj — kuŝante ĉe limoj de Pola Respubliko — fidela kielhundo, gardanta la havaĵojn de sia sinjoro, fidela estis en jaro milnovecentdekoka, fidela estis ĉiam, kiam la Patrujo havis ĉagrenojn kaj bezonis ĝian helpon.

Ankaŭ l'ovaj esperantistoj estas ĉiam fidelaj al siaj idealoj. Ankaŭ — ĉiam fidele la Societo Esperanto en Lwów — vivanta, kaj disvolviganta ĉi tie preskaŭ 40 jarojn — vivas kaj kreskas ĝis hodiaŭ, posedante en siaj kadroj multajn el tiuj ĝesamideanoj, kiuj estis ankoraŭ ĉe ĝia naskiĝo.

Urbo plej heroa kaj plej gaja en Polujo, hejmo de Szczepko, Tońko kaj sinjoro konsilanto Strońć — la plej gaja radia trio, ridiganta ĉiujn radio - aŭskultantojn, urbo vere unu el plej belaj en la tuta Polujo. En la tuta Polujo estas larĝe kaj bone konataj ĝia koro, ĝia heroa animo kaj ĝia honorkora rideto, sed malmulte, bedaŭrinde, la urbo mem. Malproksime estas eble al Lvovo, sed jen unu mirinda miraklo: ĉiu homo, simpla, ordinara homo (ne nur esperantisto), vaganta el ia ajn regiono de Polujo, trapasinta multajn kilometrojn kaj suferinta egajn dumvojajn maloportunaĵojn, veninte Lvovon, sentas sin tute hejme, forgesas doloron kaj laciĝon ŝajnas al li, ke



Lvova blazono el tombejo de Defendantoj de Lvovo.  
Sur blazono surskribo: Ĉiam fidela.

li devis eble iam ĉi tie vivi, ĉar ĉio estas tiel proksima al li, tiel parenca, tiel kara, tiel hejma. Certe ankaŭ luvonanoj rememoras lian vizaĝon, ĉar ĉiu surstrate al li ridetas, ĉiu volontege al li en ĉiu okazo servas, formas, kondukas. Ne estas eble perdi en Lvovo vojon, ĉar ĉien kondukos vin 300.000 kondukantoj. Ĉar tiom da loĝantoj Lvovo posedas.

Lvovo estas gastama, gastama, kaj, kore invitante ĉiujn polajn kaj eksterlandajn esperantistojn, atendas ilin malpacience. Ĝi atendas ilin por montri ĉiujn siajn belajojn, ĉiujn trezorojn, rememoraĵojn kaj sanktaĵojn, ĝi atendas ĉiujn, por kun ili dividiĝi per sia koro — kaj gajigi ilian malgajan animon per sia rideto.

Venu do ĉiuj — amase kaj volontege. Venu ĉiuj al nia ĉiujara, pol-esperanta festo, — venu, por tie ĉi komune eklabori dum du tagoj por nia kara ideo sincere, kore kaj fervorplene.

Ne estas eble hazardo, ke hodiaŭ, kiam la aero super la tuta terglobo zumas de armilara krakado, kiam animoj niaj, terurataj ĉiumomente de sovaĝaj okazaĵoj (perforto kaj maljusteco bezonas tiom da fortoj), ke hodiaŭ ĝuste la Pollanda Kongreso okazos en Lwów, heroa, kavalira urbo — ununura en Polujo, sur kies blazono pendas rubando da plej glora pola ordeno „Virtuti Militari“, gajnebla nur sur militkampoj. Ne estas eble hazardo, ke ni iros ĝuste al Lwów,

por serĉi ĉi tie esperon por estonteco kaj kredon al propraj fortoj.

Do ne hezitu — kaj venu al Lwów. Aliĝu tuj!

*Józef Toczyski.*

De la Redakcio. S-o E. M. en K. K. Laŭ modelo, lasita al ni de la Majstro, la propono „vi“ en korespondado oni skribas per minusklo (malgranda litero). Cetere bv. kompari „you“ en la angla lingvo.

*M. P. S. N. F.*

*Ĉu vi scias, miaj karaj,  
pri miraklo de la mond',  
pri apero de „aktiva“  
esperanta nova rond'?*

*Vi ne kredas?... do mi juras  
ke ĝi estas sankta ver',  
tiu rond' ne nur aperis  
sed eĉ AGAS por Afer'!*

*Ĝi de ĉiuj asocioj  
kaj de rondoj iĝis ĉef'  
kaj nom' ĝia nekutima  
estas M. P. S. N. F.!!*

(Klarigo: Multe Parolantaj Sed Nenion Farantaj.)

*Eugeniusz Matwiejczuk.*

## IX POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ ĜENERALA KUNVENO DE P. E. D.

okazos la 9 — 10 IX 1939 en Lwów.

**Adreso:** IX Pollanda Kongreso de Esperanto, Lwów, Kościuszki 6.

**Kotizo:** 3 zl, junularo ĝis 18 jaroj, studentoj kaj akompanantaj familianoj pagas duonon.

**Loĝejoj:** Ĉiu kongresano estas petata menciian loĝejon li deziras. La Komitato klopodas pri konvena loĝado.

**Interkonatiga Vespere** okazos la 8 IX je la 20 horo en unu el la ĝardenaj restoracioj.

Por la L. K. K.:

Mgr N. Herr  
sekr.

Józef Toczyski  
prezid.

### ĜENERALA KUNVENO DE P. E. D.

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj grupoj per siaj rajtigitaj reprezentantoj. Ĉiu reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en

kiu estu citita nombro de la membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

**Tagordo:** 1) Raportoj. 2) Raporto de la Rev. Komisiono. 3) Fikso de la sekvanta Ĝ. K. 4) Elektoj. 5) Demandoj kaj proponoj. Proponoj pri la tagordo devas esti senditaj 2 monatojn antaŭ la Ĝ. K.

Art. 26. § 1. Ĝ. K. estas decidopova, se la ĉeestantoj rajtigitaj al voĉdono reprezentas minimume  $\frac{1}{4}$  da ĉiuj vooj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P. E. D. kune.

§ 2. Se la Ĝ. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la Ĝ. K., dum kiu la decidoj estas alprenotaj sendepende de la nombro de reprezentitaj voĉoj. Tiun ĉi novan Ĝ. K. ne koncernas normoj de art. 21 §§ 1 kaj 2, art. 25 § 3 alineo 1.

**Estraro de P. E. D.**

## KOMUNIKO DE I. E. L.

Jarlibro de IEL por 1939 j. pro epidemio de gripo reganta tiutempe en Londono aperis kun monata malfruigo. Nun ĝi jam estas dissendata al individuaj anoj en Pollando. Al pollandaj membroj ĝi do venas kun kroma malfruigo kaŭzita de dogana kontrolo, lastatempe pro nunaj cirkonstancoj pliseverigita. Malpacienuloj do pardonu la prokraston.

ing. M. Chmieliński  
ĉefdelegito de I. E. L.  
Toruń, Krasińskięko 4.

HENRYK SIENKIEWICZ

(„La Kruckavaliroj“)

## LA BATALINVITO.

La reĝo ĵus forrajdis de lagobordo kaj direktiĝis al polaj eskadronoj ĉe maldekstra flankarmeo, kie li estis zondekoracianta tutan aregon de kavaliroj, kiam subite oni sciigis lin, ke du heroldoj rajde venas el flanko de kruckavalira militistaro.

Koro de reĝo Władysław ekbatis pro espero.

— Nu, eble ili venas proponi justan pacon?

— Dio allasu! — respondis sacerdotoj.

La reĝo sendis inviti Witoldon, kaj intertempe la heroldoj ne rapidante proksimiĝis al la tendaro.

En hela sunluno bonege videblaj ili estis veni sur grandegaj per draptukoj kovritaj batalĉevaloj: unu havis sur ŝildo imperiestran nigran aglon sur orkolora fono. Vicoj de militistoj dispaŝis antaŭ ili, kaj ili, deĉevaliĝinte, post momento ekstaris antaŭ la granda reĝo kaj, iom klininte kapojn je signo de respekto, jen plenumis sian sendordonon.

— Majstro Ulriko — ekdiris unua heroldo — invitas vian majeston, sinjoro, kaj princon Witold, al ĝismorta batalo kaj por stimuli vian kuraĝon, videble al vi malkantant, — li sendas al vi tiujn ĉi seningajn glavojn.

Dirinte tion, li metis la glavojn ĉe reĝaj piedoj. Jaĉjo Mażyk el Dąbrova tradukis liajn vortojn al la reĝo, sed apenaŭ li finis, antaŭenpaŝis la alia heroldo kun grifo sur ŝildo kaj ekparolis tiel.

— Majstro Ulriko ordonis krome anonci al vi, sinjoro, ke se la batalkampoj estas por vi tro malvasta, li iom retiros sian militistaron, ke vi ne malvigliĝu, kaŝinte sin en arbetaro.

Jaĉjo Mażyk ree tradukis liajn vortojn kaj sekvis silento, nur kavaliroj en reĝa akom-

**Dum la balta semajno en Kaunas okazos Baltlanda Esp.-konferenco kaj Litova Jubilea Esp.-kongreso en tagoj de 9—12 junio 1939. Ekzekutiva komitato de Pollanda Esperanto-Delegitaro petis s-ron prof. O. Bujwid partopreni la konferencon kaj reprezenti la pollandan samideanaron. Al la konferenco ni deziras plenan sukceson!**

panantaro komencis dentgrinci pro tia fikuraĝego kaj ofendo.

Lastaj esperoj de Jagiello disbloviĝis, kvazaŭ fumo. Li esperis senditojn de paco kaj konkordo, kaj jen ĉi tiuj — estis senditaj de fifiero kaj milito.

Do, levinte supren larmajn okulojn, li jene respondis:

— Glavojn ni havas sufiĉege, sed ankaŭ tiujn ĉi mi akceptas, kiel venkaŭguraĵon, kiun Dio mem sendas al mi helpe de viaj manoj. Kaj ankaŭ Li ellimigos la batalkampojn, kaj mi apelacias al Lia justeco, prezentante plendon pro la maljustaĵo al mi farita kaj via fifiero kaj senleĝeco — amen.

Kaj du grandaj larmoj malsuprenfluis sur liaj sunbrunigitaj vangoj.

Dume la kavalaraj voĉoj en lia akompanantaro komencis voki.

— Germanoj malantaŭeniĝas. Ili vastigas la batalspacon.

La heroldoj foriris, kaj post momento oni ree vidis ilin rajdi sur dekliveton supren sur iliaj grandegaj ĉevaloj kaj brili en sunlumo per silkaĵoj, portataj surkirase.

— — — — —  
Pola militistaro elvenis el arbaro kaj arbeto en bonorda batalfalango. Ĉe antaŭo staris tiel nomata „fronta“ rotego, konsistanta el la plej teruraj kavaliroj, malantaŭ ĝi — la martela, kaj malantaŭ la martela — la infanteria kaj dungbatalistaro. Tiamaniere inter la rotegoj formiĝis du stratoj, tra kiuj tien kaj reen rajdegadis Zyndram de Maszkowice kaj Vitold. La lasta sen kasko sur kapo, en brila kiraso, similanta malbonaŭguran stelon aŭ flamon, pelanta de ventego.

La kavaliroj plenspirigis brustojn kaj pli firme sidkorektiĝadis sur ĉevaloj.

Batalo estis komenciĝonta ĉiumomente.

La batalo transformiĝis en buĉadon kaj peladon. Kiu ne volis rekoni sin venkita — tiu pereis. En la mondo okazadis tiupeoke multaj bataloj kaj kunarmilaj renkontiĝoj, sed neniu el vivintoj memoris tiel teruran masakron. Sub piedojn de la granda reĝo falis ne nur Kruckavalira Ordeno, sed ankaŭ tuta Germanujo, kiu per plej brila kavaliraro helpadis tiun ĉi antaŭgvardian teŭtonan gardanton, pli kaj pli multe eniĝantan en slavan korpon.

El sepcent „blankmanteluloj“ estre antaŭirantaj la germanan superakvegon, restis apenaŭ dekkvin. Pli ol kvardek mil kadavroj kuŝis en eterna dormo sur tiu ĉi sangumita bataltereno.

Diversaj standardoj, kiuj ankoraŭ tagmeze flirtis super sennombra kruckavalira armeo — ĉiuj ili trafis en venkajn kaj sangumitajn manojn de poloj. Eĉ ne unu saviĝis kaj jen nun ili estis ĵetataj de polaj kaj litovaj kavaliroj al piedoj de Jagiello, kiu pie levante okulojn al ĉielo ripetis per emocia voĉo: „Dio volis tion“. Antaŭ majesto de la estro oni prezentadis pli altrangajn batalkaptitojn. Abdank Skarbek el Góry alve-

turigis stetiĝan princon Kazimiron, Trocnowski — ĉeĥa kavaliro — Konradon, princon de Oleŝnica, kaj Przedpelski Kropidowski — laŭ blazono Dryja — svenantan pro vundoj Georgon Gersdorf, kiu estis gvidinta ĉiujn kavalirojn-gastojn sub standardo de Sankta Georgo.

Dudek du nacioj partoprenis la batalon de la Ordeno kontraŭ Poloj, kaj nun reĝaj skribistoj registris militkaptitojn, kiuj genuante antaŭ la reĝa majesto, petegis pri kompto kaj elaçeta hejmenveno.

Tuta kruckavalira armeo ĉesis ekzisti. Polaj persekutaj taĉmentoj militakiris grandegan kruckavaliran tendaron, kaj en ĝi — krom masakrorestintoj — sennombrajn ĉaregojn, ŝarĝitajn per katenoj, destinitaj por Poloj, kaj per vino, destinita je granda venkofesteno.

Kaj ne nur malfidelema kruckavalira Ordeno kuŝis renversite ĉe piedoj de la reĝo, sed tuta germana potenco, superakvumanta, kvazaŭ ondo, malfeliĉajn slavajn landojn, frakasigis sur pola brusto dum ĉi tiu tago de repago.

*Elpoligis ing. M. Chmieliński  
Toruń.*

## RESPONDO AL RESPONDO.

Estimata S-ro Chmieliński!

Dankante al vi pro viaj „malemfazaj“ vortoj, per kiuj vi „afable“, en via publika respondo al mi, komparis min al „bleketanta, perdita ŝafido“ mi opinias necesa komuniki al vi ĉi-letere, ke post tiu interŝanĝo de niaj „leteroj“, mi decidis rezigni kaj ĉesigi diversajn inter ni porsamaferajn polemikojn kaj diskutojn. Mi tute ne volas unua komenci, malsaĝe sur kolonoj de P. E. aspektantan, nekonsentan kun ambicio kaj honoro de esperantisto (kiu, malgraŭ ĉio, mi tamen estas!) senbezonan... kverelon. Estimata Sinjoro! De „mia“ Kamienskosiński al via Toruń estas iom tro malproksime, do mi ne povas alveni gaste vin kaj kunporti la faktojn de vi petatajn. Bedaŭrinde!! Ĉar tiuj faktoj mi tamen posedas, eble eĉ pli multajn ol vi imagas, tamen skribi pri ili mi ne volas, ĉar tio estus nur „alŝutado de sulfuro al fajro“ laŭ pola proverbo. Citado de tiuj faktoj malgraŭvole starigus min en rolo de kverel-instiganto, kaj tion mi penas por ĉioma prezo eviti. Mi nur volas aldoni, ke tiujn ŝtonojn sur nia vojo mi vidas certe pli bone, ol vi imagas, eble (pardonu!) mi vidas ilin pli bone, ol vi mem, sed, vel... diferencaj estas niaj vid-

punktoj kaj opinioj pri trairado de tiu vojo. Interŝanĝi tamen ilin mi konsideras vana kaj senrezulta. Por kio? Via publika respondo al mi, aperigita en aprila numero de P. E. nur fortikiĝis min en konvinkigo, ke krom diversaj komparoj al „bleketantaj ŝafidoj“ mi nenion novan ekscios de vi. Do sen superfluaĵ komentarioj mi decidis cedi unua... cedi kun difinitiva decido, ke ĉi tiu „letero“, flanke de mi, estas jam la lasta. Mi nur volas klarigi al vi, ke rilate min, vi tamen multe viaopinie... eraras. „Ĉu estis terurajo, ke mi en duonjara tempodistanco sendis al vi du aliĝilojn al IEL? Ja neniel, tion mi faras ĉiam rilate tiujn, kiujn mi opinias indaj kaj valoraj esperantistoj. Sed iafaje mi ne trafas tiujn, aŭ trafas malĝuste. Pardonu do, se la lasta okazis rilate vian personon“.

Jen viaj propraj vortoj, vortoj, kiuj dolorige min ektaŭsis. Sinjoro! Kiamaniere vi, ne konante min persone, povas verdikti pri miaj indeco kaj valoreco? Mi demandas vin: kiel!?! Se vi sciuis, kian gravegan rolon ludis en mia vivo Esperanto, se vi estus ĉeestanto de tiu animtragedio, kiun mi travivis flanke kaj kaŭze de fiega, pro Esperanto malame persekutanta min homo, eble

vi tute alimaniere verkus tiam vian publikan respondon. Sed mi ne intencas rakonti tion al vi, pro du kaŭzoj: unua, ĝi povas enuigi la legantojn. kiujn povas tute ne interesi ies ia malfeliĉo, ĉar nur „ĉiu homo havas sian tineon, kiu lin mordas“, laŭ pola pro-verbo, kaj dua: vi povus min suspekti pri cela fanfaronado pri ŝajne alpremita al mi rolo de „idemartiro“. Sed eksciu tamen (tio estas plej sankta vero!), ke pro Esperanto mi forlasis religion de miaj patroj kaj estis devigita foriri de gepatra hejmo al fremdaj kaj al mi ne tre bonrilataj homoj; ĉar dum oni starigis al mi alternativon: elektu, aŭ Esperanton, aŭ trankvilan vivon ĉe flanko de gepatroj en servo antaŭ altaro de amata eklezio (mi estis fervora grek-ortodoksulo kaj volis esti psalmisto), — mi elektis Espe-

ranton! Mi elektis ĝin senhezite, mi preferis forlasi kaj mian religion kaj miajn gepatrojn, ĉion... ĉar mi ne povis elŝiri el mia koro Tion, kio fariĝis al mi pli sankta super ĉio. Ha! Kion mi faru? Mi apartenas al tiu speco de homoj, kiuj pli vivas per sentoj ol per racio, kaj kontraŭstari tion mi ne povas. Do, tute ne mirige, ke divercaj disonancoj en nia movado iom emociigas kaj maltrankviligas min, kaj reunuiĝo de nia tendaro fariĝis por mi plej grava afero. Mi ne ŝanĝas mian devizon: nur en reunuiĝo de ambaŭ asocioj enas savo de nia Afero! Se tio ne... sed mi nenion plu diros. Malgraŭ ĉio, mi tamen iom timas tiun donacitan de vi al mi alnomon de „perdita, bleketanta ŝafido“.

*Eugeniusz Matwiejczuk.*

## XXXI-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, 29-a julio — 5-a aŭgusto 1939.

### Kvara kaj kvina informilo (mallongigo)

**Adreso por leteroj:** 31-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

**Reprezentanto en Polujo:** IEL—ĉefdelegito S-ro M. Chmieliński, ul. Krasieńskiego 4, Toruń.

**Fakaj kunvenoj:** organizontoj tuj anoncu siajn dezirojn. Lasta dato: fino de junio.

**Vizoj:** Kongresanoj el Bulgarujo, Grekujo,

Hispanujo, Jugoslavujo, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Turkujo kaj Senŝtatuloj prezentu en svisa ambasadorejo aŭ konsulejo sian kongreskarton por ricevi senpagan vizon. Kongresanoj el aliaj landoj NE bezonas vizon por eniri Svislandon.

**Aliĝoj:** ĝis 15 5 1939 aliĝis 581 el 24 landoj.

La sekretario: *Otto Walder.*

### LA MAJ'!

*Pasis vintro frosta, neĝa, pasis tempo de malĝaj',  
kaj denove ĉarma, reĝa... venis, verda, suna maj'!*

*Venis plena de belĉarmo al dezerta, nuda ter'  
kaj per floroj, verd', sunvarmo... ekheroldis pri somer'.*

*Sed samtempe kun majveno, kun alven' de ĝoja sent'  
ve! alvenis nin... malbeno de danĝer' el okcident'.*

*Venis ruĝa krimfantomo de la nova sangtempest'  
dum trankvila, pia homo refariĝos murda best'!*

*Kaj dum belo de l' primtempo en majesta venis grand',  
ekaperis en samtempo spontanea la demand':*

*Kio nun al mondo nia venos en la temp-proksim:  
ĉu anĝel' de Paco Dia, ĉu satano de fikrim'?*

*Ĉu nin venas Pac' Ĉiela je la nom' de Dia ben'  
ĉu milit', buĉad' kruela inter nuboj de fosgen'?*

*Kaj ĉu vere Sanga Faro jam estiĝis rajt' kaj dec'?*  
*Tion montros al homaro plej proksima estontec'!*

*Eugeniusz Matwiejczuk  
(Kamień Koszyrski).*



## AL NEKONATA KONATO

Eugeniusz Matwiejczuk.

*Permesu danki vin, kolego,  
Pro bondezir' kaj sentiment'.  
Volonte estas akceptata  
De vi sincera kompliment'.  
Modesti tro — ne havas sencon!  
(Senhonto estas mia as'.)  
Al ĉio spite tranĉas ondojn  
Bluvela mia galeas'.*

*Ankoraŭ nin purgatorio  
Atendas sur poeta voj'!*

ADOLF KERNER.

## TURISMO.

Fremdaj regionoj, fremdaj homoj... Preskaŭ ĉiu el ni sonĝis en la juneco pri grandaj aventuroj, pri vojaĝoj al nekonataj, transmaraj landoj, kies ekzota vivo ekscitis nian junan fantazion kaj instigis arde realigi kelkan kuraĝan entreprenon, pri kiu ni legis en frapantaj romanoj kaj aliaj sensaciaj libroj. Kiu ne volis surŝipiĝi al mondvojaĝo kaj esti dumvoje alpelita per ŝtormo al senhoma insulo kaj pasigi tie la vivon, unue sola, poste, pli aĝa, kun ĉarma fraŭlino? Ni ĉiuj sopiris eliĝi el malvastaj urburoj, el griza, enuiga vivo por spiri pli libere kaj senĝene. Multaj penis forkuri el la hejmo kaj iri en la mondon. Ni legas ofte en la gazetoj, ke oni tie kaj tie kaptis infanvagabondon, fuĝantan en Amerikon aŭ Abesinion, kaj kiam la polico venigas lin hejmen, li denove fuĝas. La interna malkvieto, kiu estas kaŭzata de socia maladaptado de la homo, ne ĉesas poste kaj ŝanĝiĝas en la emon kunvivi kun la naturo, en la romantikan atendon de aventuroj. La skolta movado ĉerpas el tiu fonto la racion de sia ekzisto kaj pro tio ĝi estas favorata de la junularo.

Kiam ni estas pli aĝaj, la preskaŭ patologia inklino al la vagabonda vivo malaperas kaj preskaŭ ĉiu, kiu revis pri aventuroj en sovaĝaj landoj, vivas trankvile en sia butiko aŭ oficejo, eĉ ne sonĝante forkuri el la hejmo por eble ne esti rigardata... frenezulo.

*Sen memkritiko — vana ĝoj' —  
Verkisto taŭgas por nenio.*

*Ĉu celu ni je ora glor'?  
Ĉu ebriigu nin laŭdkantoj?  
Ĉu tremu ni pro ĉiu vort'  
De profesiaj kritikantoj?*

*Ni paŝu nur laŭ propra voj'  
Renkonte al reala revo,  
Kaj nia penso, kamarad',  
Libera estu kiel mevo!*

Ludmila Jevsejeva.

Ne ĉiuj tamen. Ekzistas homoj, kiuj ankaŭ en plia aĝo provas certan formon de la forkuro el la bruo kaj haladzo de la granda urbo, for de la tramtintado de nervostreĉa kaj naŭza ekscito, kvazaŭ la beno de la civilizacio tro pezus sur iliaj ŝultroj, kaj ili volus ĵeti ĝin, vivi en pli primitivaj kaj konformaj al la naturo kondiĉoj. Tiu formo de la forkuro el la rafinita urba kulturo estas en mia kompreno la turismo, efektiviganta la spontanegan puŝon al la naturo.

La nocio pri la turistiko estas plejparte malklara. Kiu ekskursas pervagonare Parizon aŭ Vienon, estas sendube turisto, Amundsen, faranta ekspedicion al la suda poluso, estas turisto, „globtrotter“, kiu piede trairas la mondon estas turisto, kiu veturas en apudurban somerumejon ankaŭ estas turisto.

Por la orientiĝo estas distingindaj (laŭ mi) en la turismo du diversaj specoj: la pasiva kaj la aktiva, la sporta. La pasiva turismo ne postulas de la turisto penon aŭ fortoŝteĉon, ĝi dependas nur de la bona organizo de trafikiloj: aŭtobusoj, aŭtokaroj, trajnoj, vaporŝipoj k. t. p. Ni scias, kiel aspektas la ekskursoj, ekzemple per popularaj vagonaroj. Oni ŝtopas homojn en la kupeojn kiel haringojn en barelojn kaj kiam ili jam sufiĉe estas elpremitaj kiel uzitaj citronoj, oni elĵetas ilin senceremonie en nekonatajn lokojn, kaj tion oni nomas turismo...

## EL VIVO.

(Rememoraĵo).

Mi verkas, mi verkas en Esperanto. Sur kolonoj de „Pola Esperantisto“ dank'al aŭfaleco de la Redakcio, estas ofte aperigataj miaj versoj, noveloj... Ĉu iu legas ilin? Su-

pozeble, ke... jes. Pri mi oni iam ekdiris, ke mi havas tamen iom da literatura talento... ke mi ekzeru tiudirekte...

Mi verkas... mi verkas versojn... verkas

novelojn... Mi ŝatas, tre ŝatas esperantan poezion, en tuta signifo de tiu ĉi esprimo. Jevsejeva, Schoor, Belmont... mi ja legas iliajn versojn kun plej granda plezuro, ili ja...

Sed malgraŭ ĉio, mi tamen pli preferas novelojn. En novelo oni povas ja pli bone, pli precize kaj pli facile, ne ĝenate de rimo kaj ritmo elparoli sian penson. Rimo kaj ritmo, tiuj du ĉefaj kaj necesaj kondiĉoj de versfarado, por novel-verkado estas ja tute senbezonaj. Tial en novelo pli libera...

— — — — —  
Mi skribas novelojn...

Plej ofte dum sendormaj noktoj aperas... penso, eta, eteta... sed tamen pli kaj pli alprenanta iun difinitan, pli konkretan formon. Mi pensas intense, mi serĉas konvenajn vortojn, rapide laboras stimilita cerbo...

Kaj poste mi prenas krajonon...

— — — — —  
Miaj noveloj estas nur fruktoj de mia imagado, de mia fantazio, iluziaj fruktoj ne-realaj...

Por iom similigi ilin al efektivo, mi ofte enrigardas en vivon... Mi serĉas...

Kaj ofte mi trovas temojn jam entute pretajn, pretajn... novelojn... Realajn ĉiutagajn okazintaĵojn, sed ofte pli interesajn, ol iu imagita fantaziaĵo...

Nur sidiĝi kaj skribi...

Tio, kion mi nun skribas, tute apartenas al speco de noveloj... ĝi estas simpla, proza bildeto, kiu tamen...

— — — — —  
Malĝoja kun peza koro, deprimita, mi sidis sola, en tute malplena atendejo de stacidomo en Piŝk. Mi atendis vagonaron, per kiu mi estis reveturonta hejmen. Estis ĉirkaŭ unua horo post tagmezo...

Mi ĉeestis en Piŝk nur kelkajn horojn, sed dum tiu mallonga tempo mi travivis multe. Mi venis en Piŝk'on, por en loka oficejo de ortodoksa konsistorio, klarigi tre malagrablan aferon, en kiun mi nevole enfalis kaj en kiun enplektis min tre lerta tiu-direkte, damninda, fia hom... de la sama paroĥo, kie mia patro plenumis funkcion de psalmisto. Ho, malbona, malagrabla estis tiu afero, afero tiom malgrablega, ke ne nur al mi, sed eĉ al mia patro minacis grava danĝero, kunligita kun eblo perdo de okupata de mia patro posteno de psalmisto. Mi venis Piŝk'on, por ŝerci ĉe ĉefuloj de konsistorio, de kiuj ni estis dependantoj, kiel servistoj de eklezio, esperatan justecon kaj priesploron de la tuta afero, sed...

Nu, malgravas... Tio jam apartenas al nerevenebla pasinteco. Mi nur volas diri, ke de unu jaro apartenante al rom-katolika eklezio, forlasinte mian, iam fervore de mi amatan religion de ĝepatroj, forpelita de altaro... de popoloj mem (mi volis esti psal-

misto), devigita de la fiulo forlasi tion, kio iam estis sanktaĵo por mi, mi nun rememoras tiujn okazintaĵojn kun ia malgrablega sento, kun eksento de grandega, farita al mi maljustaĵo... mi rememoras kun larmoj en okuloj...

Kaj mi malbenas la fiulon...

— — — — —  
Pardonu al mi, karaj legantoj, ke mi kuragiĝis preterŝovi antaŭ viaj okuloj la malgrandan peceton de enuiga filmo... el mia vivo.

— — — — —  
Mi sidis malĝoja, kun koro plena de mal-espero... per okuloj de animo mi vidis, ŝajne, krepuskan vojon, kondukantan min al abismo... al perejo. Mi sidis deprimita, enpensiginta, enrigardanta en nigran pereje minacantan al mi estontecon. Kion fari! Kio estos? Kio min atendas? — similaj demandoj enpremiĝadis mian doloriĝantan kapon, batis, turmentis min, senrespondaj... Grandeco kaj malpleneco de atendejo, silento kaj angule insidanta, ŝajne, ia malamika fremdeco pligrandigadis mian animsuferon, pleniĝadis mian koron per nigra, sufoka malespero.

Kaj ŝajnis al mi, ke ĉio jam estas finita... (mi estas tre nervema). Kaj jen... dum mi tiel sidis sola, silenta, en muta animbatalo kun nigraj, malesperigaj pensoj, subite... mallaŭte ekkrakis pordo kaj la malplena ĉambregon eniris... homo. Je unua ekriĝado mi rekonis en li unu el tiuj, kiujn mallica, kruela sorto speciale elektas kiel viktimojn por siaj persekutoj. — Ankorau unu simila al mi... — traflugis tra mia kapo kaj mi, nevole, komencis observi la enirinton. Ho, mizera, malfeliĉa estis tiu homo. Lia korpo estis kovrita por ia, mallerte kunkudrita ĉifonaro, kiu delonge jam perdis aspekton de vestaĵo. Disŝiritaj botoj, prezentis jam nur etajn rimenetojn, flikaĉojn, kunligitajn per ŝnuretoj kaj apenaŭ teniĝantaj sur piedoj. Esprimo de granda mizero kaj malsato elaspекtis el vizaĝo de la mizerulo. Li eniris, momenton haltis en la pordo, poste per ŝtela, ia timema paŝo ŝoviĝis antaŭen. Li proksimiĝis al benko staranta ĉe muro, deŝovis ĝin kaj komencis serĉi ion sur planko... serĉis zorge, diligente... — Li serĉas cigared-restaĵojn, — mi ekpensis, observante tiun kompatingan viron. Li serĉis en ĉiuj anguloj, tie kaj ĉi tie, enrigardadis sub ĉiun benkon, en ĉiun plankofendon, sed, evidente, nenion trovis, ĉar esprimo de seniluziigo aperis sur lia mizera, laca kaj malĝojega vizaĝo. Kun rezignacio li mallevis manojn kaj senesperan vidon enigis en fenestron. Kelkajn momentojn li rigardis mute, subite... la okuloj ekbrilis, senesprima vi-

zaĝo alprenis ian vivecon... li rapide proksimiĝis la fenestron. Li rigardis, kaj ŝajnis al mi, ke en tiuj lacplenaj, plorstimulaj okuloj kunamasigis lia tuta malfeliĉa, turmentata animo. Mi ekrigardis la fenestron: laŭlonge de perono iris iu fervoj-oficisto. En dentoj li tenis... cigaredon, li fumis... Li enspiris kelkfoje grizetan fumon kaj forjetis fine la fumetantan restaĵon. Forjetis... kaj senhalte iris pluen.. iris kaj malaperis post ia konstruaĵo.

Kaj tiam la mizera, kompatinda homo rapide, per silentaj ekpaŝoj ekkuris el la ĉambrego...

Kiam li revenis, en lia buŝo ardis malgranda peceto da cigaredo... maldika fumstrio levigadis supren...

Sur mizera, malgrasa vizaĝo, sur kiun metis sian signon ...malsato, pentrigis esprimo de neparolebla, ĝua feliĉeco.

Mi forgesis pri mia propra malfeliĉo. Kun larmoj en okuloj mi observis...

*Eugeniusz Matwiejczuk.*

## BIBLIOGRAFIO.

### RECENZOJ.

**J. LAZAUSKAS:** *Tarptautinés Esperanto Kalbos Vadovėlis su žodynėliu.*

Kun vera intereso, ni rigardis la libreton, senditan de la Aŭtoro al la Redakcio por recenzo. La broŝuro sur 112 paĝoj enhavas: enkondukon (? prakalba), ekzercaron kun gramatiko, anekdotojn, vortaron esp.-litovan, postparolon, litovajn tradukojn de la esperanta ekzercaro kaj kelkajn informojn pri la esperanta movado.

La tutaĵo prezentas sin tre interese kaj kredeble estos valora diskonigilo de la Esp.-lingvo. Eĉ tiu, kiu ne konas la lingvon, volonte foliumas la libreton por ekhavi iom da ideo pri la lingvo de la popolo, kun kiu ni dum kelkaj jarcentoj travivadis gloriojn kaj kadukojn, feliĉojn kaj malfeliĉojn, de la popolo tiom proksima al niaj koroj, kun kiu ni tamen ne povis post reliberiĝo de niaj ŝtatoj trovi »komunan lingvon«, kiu permesus al ni konkorde vivi kiel bonaj najbaroj. Bonŝance tiuj malagrablaj tempoj apartenas jam al pasinteco. Estas afero de la plej proksima estonteco konatiĝi reciproke kaj sincere amikiĝi. Esperanto helpu nin en tiuj penadoj!

**EIAR** — Roma, Via Montello 5, publikigas regule ĉiumonate radioprogramon de italaj mallongondaj radiostacioj, interalie ankaŭ en Esp. Ĝi estas senpage ricevebla laŭ la indikita adreso. La direkcio volonte akceptas proponojn, korespondadojn koncerne la programon. Estas devo de la samideanoj subteni la klopodojn de la italaj esperantistoj, kiuj sukcese aplikas Esperanton en propagando de la lando.

**LA JARLIBRO DE I.E.L. — 1939.** Neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de I.E.L. Bazaj kotizoj: Membro kun Jarlibro 4 angl. ŝil.; MA, 10 ŝil.; MAH, 18 ŝil.; MS, 25 ŝil.

En kelkaj landoj ekzistas specialaj kotizoj en la landa valuto. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo, aŭ ĉe Landaj Ĉefdelegitoj kaj Perantoj.

La Jarlibro entenas interesajn informojn pri la movado kaj devas troviĝi en manoj de ĉiu uzanto de la lingvo, servante kiel abunda fonto de aktualaj informoj pri la lingvo, ĝia disvastiĝado, adresojn de delegitoj de IEL kaj t. p. La libro estas bele eldonita sur bona papero.

## RADIO.

Per radio Esperanto eniras sur kampon vere praktikan! Subtenu la E. dissendojn!  
Skribu al la stacioj!

### PROGRAMO DUM JUNIO

La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.

### REGULAJ ĈIUSEM AJNAJ DISSENDOJ.

**Dimanĉo:**

9.45—10.00 Lille: Esperanto-kroniko.

10.10—10.25 Kortrijk (204 m) Kroniko de G. Dehrouwere.

22.30—22.45 PRC 7. Mineira (960 kil.) „Momento de Esperanto“.

**Lunde:**

19.45—20.00 Montpellier - Languedoc (224 m) Kroniko de A. Capoulade.

20:00—21:00 JV 2 RL Caracas (51,72 m)  
Parolado.

21:50—22:10 Romo 2RO6, 19:61, 2RO9  
31.02 k. eventuale Romo II, (245 m)  
Semajna bulteno.

23:45—0:30 Paris PTT (431 m) Espe-  
ranto-teatraĵo.

### Marde:

21:20—21:35 Kaunas (1936 m) Klaipeda  
Memel 531 m) Lyiae (35 m) „Nia an-  
guleto“.

22:00—22:10 Turi (410 m), Tartu (579 m),  
Tallinn (229 m) E. kroniko.

22:25—22:40 PRF5 (31:58 m), PRF 2  
Rio-de-Janeiro (780 m): Informoj kaj  
kantoj.

23:35—23:40 PRF3 (31:58 m), PRF2  
(780 m), Rio de Janeiro, Oficialaj in-  
formoj kaj kantoj dum la „Horo de  
Brazilo“.

### Merkrede:

2:45—3:45 XECR (50:17 m) Mexico —  
Esperanto-kroniko.

19:45—20:00 LTI Rosario (384 m):  
Esperanto-kroniko.

### Ĵaŭde:

10:30 — 10:45 Paris PTT (431 m): Esp-  
kurso.

### Vendrede:

2:45—3:45 XECR Mexico (50:17 m) --  
Kroniko.

### Sabate:

10:30—11:— 7 HO HOBART — E. kro-  
niko.

17:15—17:30 Loksbergen-Limburg (202  
m), Esperanto-kvaronhoro.

18:40 — 19:00 Roma II (245 m); IRF  
(30:52 m) kaj 2RO9 (31:02 m)— Turis-  
ma kroniko.

20:00—20:15 PRF 8 Pernambuco (960 m):  
Informoj, kantoj kaj kurso.



## NOVA VARIA PROGRAMO el PARIS

ĉiulunde je la 22a45 MET el PARIS PTT  
(431 m) escepte la 15 an de majo, 19 an  
junio (ĉiu 5 lunde) je 23a Radio PARIS  
(1648 m).

De nun la programo estos varia: espe-  
rantista kabaredo kun R. Schwartz ĉiumo-  
nate, turismaj kaj folkloraj skeĉoj, historiaj  
radiosencoj pri la franca revolucio kaj pri  
la vivo de Doktoro Zamenhof, k. t. p.

Aŭskultu kaj diskonigu kaj nepre skribu  
por subteni al:

„**Courrier des Auditeurs, 107 rue de Gre-  
nelle PARIS 7<sup>e</sup>**“ repesigu ĉiufoje en la ga-  
zetoj ĉi tiun adreson kun instigo al skribado.  
Dankon! tiu skribado estas nepre necesa:

1-o por konvinki la francajn instancojn,  
ke multaj esperantistoj aŭskultas malgraŭ  
multaj petoj pri diversaj aliaj dissendoj neesp.

2-o por ke la organizantoj sciu, kiujn pro-  
gramojn vi preferas, kaj ilin plibonigi laŭ  
viaj diziroj

3-o la plej bona **kritiko** ĉiumonate gajnos  
premion (3-monatan abonon al F. E.)

4-o same gajnos ĉiumonate la plej bona  
**sugesto**.

5-o je la fino de la dissendoj estos laŭ-  
eble respondata ĉiulunde al la korespon-  
dantoj per la mikrofono.

PTT. (elparulu: petete) estas Poŝto Tele-  
fono Telegrafo.

## POR JUNIO

5an: denove „**Esperantista Kabaredo**“ kun  
Raymond Schwartz kaj kunlaborantoj.

12an: HIMNO Belega poemo de Jules Ro-  
main deklamota de MDARNAULT kaj  
„ĈAGRENEGOJ“ komedioto de Geor-  
ges Courteline adaptita de Roger Ber-  
nard. Bonega vespero: poezio kaj sprito.

19an: (Radio Paris 23a) „AL LA VAREN-  
NE“ turisma skeĉo de J. Mahé (kun  
muziko). „La Varenne“ estas urbeto  
apud Paris, kien dimanĉe post la se-  
majna laboro multaj Parizanoj iras serĉi  
riponon, puran aeron, sporton kaj amu-  
zon. Juna kaj freŝa dissendo.

26an: (Paris PTT 431 m je la 22a45) „NA-  
SKIGO de LINGVO“ Tre grava dis-  
sendo por esperantistoj; temas pri na-  
skigo de Esperanto. Scenoj originale  
verkitaj de A. Remond pri la ideo de  
L. Zamenhof junulo; la unuaj provoj,  
la malfacilaĵoj, kiuj baris la vojon al  
eldono de la unua lernolibro... Estas la  
unua de serio, kiu elvokas la vivon de  
Zamenhof kaj la historion de Esperanto.

Subtenu skribigante al „**Courrier des Audi-  
teurs 107 rue Grenelle PARIS**“ laŭeble  
sendu ankaŭ kritikojn kaj sugestojn.

Salom Aŝ.

## LA BLINDA GARDISTO

(RAKONTO).

Ĉe pordego de palaco staris gardisto kaj gardis, ke neniu transpaŝu la sojlon de la palaco. Neniu sciis certe, kio en tiu palaco troviĝas, kaj kion la gardisto tie gardas.

Ĉar neniu tion pezan pordegon iam malfermis, rondiris inter la homoj diversaj rakontoj, legendoj kaj onidiroj pri la palaco.

Luj diris, ke en la palaco troviĝas kaŝitaj trezoroj kaj riĉaĵoj — la riĉeco, kiu konsistas en tiaspeca polvo, kun kiu ĉiuj ĉambroj, ĉiuj keloj kaj okultaĵoj en la palaco estas plenigitaj kaj tiu, kiu posedas sableron de tiu polvo, ĉe tiu aliformiĝas tio je konstante fluanta oro, kiu neniam finiĝas.

Aliaj diris, ke ne la mistero de riĉeco estas tio, kion la palaco kaŝas en siaj ŝambroj, kaj ne pordojn de riĉeco gardas la gardisto, sed la amo loĝas en la palaco, kaj ĝian fonton la gardisto gardas. Tie troviĝas bela virino, sur kies lipoj estas la nektaro de la amo kaj, se ŝi kisas iun per siaj lipoj, ŝi elvokas ĉe li misteron de amo, kaj eterna amo-fonto neniam elĉerpiĝas en lipoj de la feliĉulo, kaj kiun la feliĉulo ektuŝas per siaj lipoj, kisitaj de la diino de amo, al tiu li transdonas la misteron de amo.

Aliaj diris, ke ne la diino de la amo loĝas en tiu palaco kaj ne la fonton de la amo gardas la gardisto, sed la fonton de la eterna juneco. En la palaco, ili diris, troviĝas mirinda fonto de kristal-pura akvo kaj la feliĉulo, kiu subakviĝas en tiu mirinda fonto, renovigas por eterne sian junecon: lia sango cirkulas en liaj vejnoj, kvazaŭ ĝi estus pelita de printempaj ventoj. En liaj ostoj moviĝas la plej freŝa medolo, lia haŭto neniam difektiĝas, kaj ĝia koloro neniam ŝanĝiĝas, liaj okuloj restas ĉiam junaj kaj sur liaj lipoj briletas ĝiam la printempa roso.

Sed la pli maljunaj kaj la saĝuloj diris, ke nek la riĉeco, nek la amo, kaj ankaŭ nek la juneco estas tio, kio troviĝas en la palaco, kaj nek la feliĉaĵoj de la homoj, (kiel karaj ili estu) estas tio, kion la gardisto gardas, sed en la palaco loĝas la dio de saĝeco. Soleca Dio sidas sur la trono en kaŝita ĉambro de la palaco, granda mirinda brilanto brilas sur lia frunto kaj la feliĉulo, sur kiun falas radio de tiu mirinde luma brilanto de la frunto de Dio, al tiu klariĝas la okuloj kaj li ekvidas la vojojn de la mondo, antaŭ li malfermiĝas la okultaj pordegoj de la ĉielo kaj tero, malkovriĝas al li la eterna enigmo de nia estado, la misteroj de l' mondo, de ĉielo kaj tero, de homo kaj Dio.

Kaj ĉiumatene vekigis la homoj — tiuj,

kiuj serĉis riĉecon kaj tiuj, kiuj sopiris amon, tiuj, kiuj volis junecon, kaj ankaŭ tiuj, kiuj deziregis la scion pri la mondo kaj ili kiel malsatitaj hundoj kun soifantaj langoj kaj elstarantaj okuloj ĉirkaŭiris la murojn de la palaco, proksimiĝante iom post iom, rigardis, flaris per la nazoj, sed jen ili ekvidis nur la gardiston ĉe la pordo de la palaco kaj tuj ili kun timo reen paŝis aŭ timigitaj estis reen puŝitaj de la pordo de la palaco.

Nek la fortega korpo de la gardisto, nek liaj larĝaj, fortaj kaj pezaj manoj, kiuj estis pli pezaj kaj pli fortaj ol la manoj, de ĉiuj aliaj homaj manoj, ankaŭ ne lia akra, brila sabro estis la kaŭzo, kiu tiom multe timigis la homojn kaj antaŭ kiu oni tiel sin retiris, sed estis la rigardo de liaj grandaj, grizaj okuloj, kiuj videbligis sub liaj densaj kaj pezaj flavaj brovoj, kiu eljetis tian grandan timon kaj antaŭ kiu oni tiel ektemis; la rigardo, kiu eligis al la okuloj de la gardisto, estis krio, kiu disrompis ĉies koron, subtrancis la piegojn kaj rigidigis ĉiun guton de sango en la homo, kiu kuraĝis veni en la spacon de lia rigardo. Lia rigardo forpelis kiel bruliganta fajrobato la avidajn homojn de la pordo de la palaco.

Sed la homoj estis avidaj, iuj je riĉeco, iuj je amo, aliaj por juneco kaj aliaj pro scio, ili turniĝadis ĉirkaŭ la altaj muroj de la palaco kun streĉitaj langoj, kun fiksitaj okuloj, flaris kaj flaradis per la nazoj por trovi malfermajn, truonfendon, tra kiu oni povus enpenetri en la palacon, sed surde kaj mute ili staris antaŭ la glataj muroj de la alta palaco kaj ĉe la kolosa pordo staris la herkulesa fortega gardisto, kiu ĉiujn forpelis per siaj timigitaj brulantaj rigardoj.

Generacioj forpasis, generacioj venis, patroj tradiciis al siaj idoj kaj tiamaniere transiris la legendo de unu generacio al la alia pri la kaŝitaj trezoroj en la palaco, pri ĝia eterna amo, ĝia mirinda fonto de juneco, kaj pri la soleca dio de la scio.

Kiel fluanta fonto, kiu elŝpruĉas el la tero kun freŝa akvo, tiel la espero je tiu palaco enradikiĝis en multaj generacioj, la patroj mortis kun la espero, ke iliaj infanoj trovos la ĝustan vojon al la palaco kaj la infanoj estis edukitaj al tiu ĉi penado, la vojo al la palaco estis la strato, sur kiu la homoj iradis kaj la ŝlosilo al la palaco estis la dezira fajro, kiu sorĉis ilian vojon.

Iufoje infano ludis per pilko antaŭ la pordo de la palaco. Subite elfalis la pilko el la manoj de la infano kaj apudruliĝis la piedegoj de la gardisto ĝis la pordo de la pa-

laco. La infano ĉasante sian pilkon, postkuris ĝin, tute ne rimarkante la severan, bruligantan ridardon de la gardisto. Eble li rimarkis ĝin, sed ne sciis, kion tia rigardo signifas kaj tute ne timiĝis, ĉar ju pli severa la rigardo de la gardisto fariĝis, des pli la infano ridis. Tiam la avidaj homoj, kiuj ĉiam sieĝis la pordon de la palaco, kun korbato timega rigardis, kion la gardisto faros kun tiu infano kaj kun angoro kaj tremantaj korpaj ili atendis la teruran finon de tiu senkulpa infano. Sed kiel mirigitaj kaj timegaj ili fariĝis, kiam ili vidis, ke la infano ludante, rampis inter la piedegoj de la gardisto al sia pilko kaj la kruela gardisto ne rimarkis tion, li staris surdmute kiel antaŭe, nur lia rigardo estis streĉita kaj li ĵetis ĝin foren kiel ĉiam ĝis nun, li ne vidis, ke la infano malfermis la pezan, feran pordegon de la palaco kaj kun scivolemo ĵetis rigardon en la densan mallumecon de la palaco.

Post la infano kuraĝis alia, kiu ne estis el tiuj, kiuj avidas riĉecon, ankaŭ ne al tiuj, kiuj sopiras junecon, kaj certe ne el tiuj, kiuj deziras scion, kiuj ekhavis la kuraĝon trapasi preter la gardisto al la pordo de la palaco post la infano; sed tiu estis juna viro kun longa malgrasa vizaĝo kun nebuligitaj nigraj okuloj kaj kies koro vundiĝis ankoraŭ en la juneco kaj li venis kuraci la vundojn de sia koro per la sanktaj fontoj, kiuj troviĝas en tiu palaco; tiu estis la junulo, kiu kuraĝis elteni la rigardon de la gardisto kaj atingi la pordon de tiu saniga palaco.

Denove la avidaj rigardantoj etendis kun

haltigita spiro la finon de tiu junulo, sed kiel ŝtonigitaj ili staris, rimarkante kiel la junulo pasas preter la gardisto kaj li ne vidas lin, kun tima brilo en la okuloj kaj korbatoj unu rigardis la alian kaj aŭdiĝis murmurado: la gardisto estas blinda, li estas blinda!

Baldaŭ vekiĝis kuraĝo ĉe aliaj, trapasi preter la gardisto kaj enŝteliĝi tra la peza pordego en la palaco kaj vidante kiel unu post alia preterpasas la gardiston kaj eniris la palacon, kaj ne estas rimarkita de la gardisto — tiam eksonis revelo ĉe la malsata malriĉa popolo — la gardisto estas blindulo!

Kaj alvenis ĉiuj malsataj kaj soifantaj tiuj, ĉe kiuj peco da pano estas feliĉo, kaj kiuj havis vunditajn korojn, kiuj supiris amon, kaj kiuj maljuniĝis sen ĝojo kaj kortremas por renovigi siajn vivtagojn, alvenis tiuj, kiuj volas lumigi sian vojon, por videbliĝi kiel mallonga kaj malvasta ĝi estas kaj interparolis unu kun la alia: vana estis nia timo, ni ne sciis, ke la blindulo gardas la palacon. Kaj ĉiuj preterpasis la gardiston, malfermis la grandegan pordon kaj enpenetris la palacon. Unu parto de la enirintaj longe restadis tie, aliaj restis tie nur mallongan momenton, sed ĉiuj revenis el la palaco kun laŭta ploro kaj diris: „Ve, ve al ni! blinda gardisto gardis malplenan vantan palacon!“

Esperantigis el juda originalo

M. Ramm

Rawa Ruska.

## De la Redakcio.

La nuna numero aperas samtempe kiel tiu maja kaj junio pro tio, ke ni volis por la okazonta en septembro Pollanda Kongreso de Esp. en Lwów havigi la plej aktualajn informojn, kiuj alimaniere ne estus publikigeblaj pro la kutimaj ferioj someraj. Anstataŭ dumonata n-ro post la ferioj, ni prezentas ĝin antaŭ ili. La plej proksima n-ro de P. E. aperos la dudekan de julio. Bonvolu memori pri tio, sendante aktualan materialon por tiu n-ro.

★ ★ ★

Adaptiĝante al postuloj de la presleĝo, enkondukita ankaŭ kelkaj monatoj, ni estas devigataj forlasi sur la kovriloj la nomojn de dro Leono Rosenstock kiel respondeca redaktoro kaj de mgro Tadeusz Hodakowski kiel kunredaktanto de la gazeto — tamen ilia kunlaboro en redaktado de la gazeto efektive daŭros plue.

## Ĉarmaj pruvoj de hungar-pola amikeco.

Hungara Esperanto-Federacio (Budapest VII, Damjanich ut 43) sendis al S-o Prezidanto Mościcki koran saluton okaze de reakiro de la komuna landlino kaj samtempan peton pri apogo por E., kiu por niaj nacioj devas fariĝi facila interkomprenilo.

Je tiu letero respondis — pere de pola legacio en Budapest — S-o Prezidanto Mościcki, dankante pro la ricevitaj bondeziroj.

★ ★ ★

Sur margeno de tiu sciigo ni esprimas esperon, ke la rilatoj inter niaj nacioj plivigliĝos. Estus tre utile organizi reciprokajn ekskursojn, kiuj nun estus tiom pli dezirindaj, ke vizitadoj de malproksimaj landoj pro la reganta politika streĉo verŝajne ne estos grandscale organizataj. Kiu prenus la iniciaton?

La Redakcio.

## POLLANDA KRONIKO.

**LWÓW.** Ĝenerala kunveno de Societo „ESPERANTO“ okazis la 29 III 1939 j.; dum kiu oni elektis jenan novan estraron: S-ino Regina Fels (prezidantino), S-o Józef Kucharz (vicprez.), S-o dro Leon Brandler (vicprez.), S-o mgr Natan Herr (sekretario), F-ino mgr Wanda Tenzer (vicsekret.), F-ino Laura Nadel (kasistino), F-ino Iza Reich (bibliotekistino), S-ino Róża Nussenbaum kaj S-o Roman Fischler direktoro de Muzika Instituto (estraranoj). — La revizian komisionon eniris S-ioj Stefania Wojakowska, Ewa Tenzer kaj Anna Ewig. — Post la detala raporto pri sia agado la ĝisnuna estraro ricevis ĉiuvoĉe absolvon. — Post la elektoj alparolis la ĉeestantojn honora prezidanto de la Societo S-o dro I. Fels i. a. per jenaj vortoj: „Ni vivas nun en terura tempo, en tempo, kiam regas la raborajto, kiam homo atakas homon, ŝtato — ŝtaton, unu ideologio — alian. Ni, esperantistoj, estas nek rabaj bestoj, nek sovaĝaj homoj, oni povas diri, ke ni estas oferemuloj, ĉar por ni Esperanto ne estas profitdona negocio, male, ni devas ofte kontraŭstari atakojn de ĉiu flanko pro oferemo al nia ideo. — Tamen per Esperanto ni spertis multajn agrablajn, ni ekkonis homojn, homajn ideojn, belajn librojn — unuvorte ni povas konstati, ke inter malmultaj tagoj, kiujn ni dum nia vivo agrable pasigis, la plejmulton ni dankas al Esperanto“. — La esperplenajn vortojn pri nia movado de la parolinto la ĉeestantoj multe aplaudis. La ĝenerala kunveno akceptis rezolucion esprimantan al dro Salomono Bund, advokato en Lwów, profundan dankemon pro lia konstanta subteno por la lvova societo.

La 27 IV 1939 j. — la Societo aranĝis vesperon okaze de mortotago de la Majstro. La vesperon partoprenis Ges-oj Fels (paroladoj), F-ino Roma Kristian (deklamoj) kaj S-o Roman Fischler (muziko). — Ĉe fino de la vespero alparolis la kunvenintojn S-o mgr Herr dirante i. a.: „Milite ne estas idealo de Esperanto, kies interna ideo estas amo kaj frateco al ĉiuj homoj, tamen en nunaj temoj, kiam ekestis potenca minaco por la plej grandaj idealoj de libereco, justeco kaj paco, nia sola kontraŭrimedo devas esti plena preteco kune kun la tuta pola popolo por eventuala milito, ĉar trankvilan estontecon por niaj idealoj povas doni al ni nuntempe nur forta kaj bona armeo“. Rezulte de posta alvoko la ĉeestantoj surloke kolektis ĉirkaŭ 50 zl por FON (Nacia Defend-Trezoro).

**WILNO.** La 21-an de IV „Universo“ festis sian dekjaran jubileon. La salono de la Juda

Teknika Liceo en Vilno estis plena de aŭskultantoj-esperantistoj kaj simpatuloj Post malfermo la blorvorkestro komencis la akademion per la himno. Sekvis tre bela kaj interesa prelego de nia prez. D-ro D. Fajnsztejn s. t. „Kial Esperanto venkos?“, en kiu la preleginto analizis detale diversajn projektojn de aprioraj kaj aposterioraj internaciaj lingvoj, pruvante, ke nur Esperanto plene kaj definitive solvis la problemon pri facila kaj internacia interkomprenilo. La prelego estis ilustrata de speciale preparitaj filologiaj skemoj.

S-ro K. Geršater prelegis pri la esperantista movado en Wilno dum la lastaj 15 jaroj kaj atingoj de „Universo“ sur la verda kampo dum sia dekjara ekzisto.

Estis antaŭlegita granda nombro da koraj, kuraĝigaj telegramoj kaj gratuloj de multaj societoj kaj unuopuloj, i. a. de Prez. de I. E. L. Generalo Bastien, Francujo, Prez. de P. E. D. Prof. Odo Bujwid, Kraków, S-ro Teo Jung, Red. de „Heroldo de Esperanto“, S-ro J. Lejzeroviĉ L. K., Łódź, S-ro Jurysta, Parizo kaj multaj aliaj. La estraro de „UNIVERSO“ esprimas al ĉiuj gratulintoj sinceran, koran dankon.

En la sama vasta salono estis aranĝita unua en Esperantujo ekspozicio ilustranta la judan partoprenon en la esperantista movado kaj literaturo per siaj centoj da objektoj: gazetoj kun koncernaj artikoloj, broŝuroj, libroj originalaj kaj tradukitaj.

Aprata tablo estis destinita por judaj verkistoj, kies verkojn oni tradukis esperantlingven.

Krome la ekspozicio enhavis parton: Mne-moniko per Esperanto, ilustrita per amaso da leteroj, dankesprimoj kaj recenzoj el ĉiuj anguloj de la mondo la vastan praktikan aplikon de Esperanto ĉe l' instruado de la memorfortigarto dank' al la esperantista perokorespondanta sekcio de Mnemonika Instituto de Dro D. Fajnsztejn en Vilno. Detalajn klarigojn pri la ekspozicio dum nia akademia faris s-ano S. Šik.

En la dua parto, muzik-voĉa, partoprenis s-anoj: F. Alperoviĉ, Lipovski kaj L. Subotnik per esperantlingvaj originalaĵoj kaj tradukaĵoj el la juda lingvo.

---

**S-ro Gwynne Humphreys (22-jara)**  
**99 Kingfield Road, Orrel Park,**  
**Liverpool 9, Anglujo,** deziras ko-  
 respondi kun pola samideano.

---

### Alvoko al sam-anoj el Zaolzia regiono.

Mi treege ĝojas, ke mi povas skribi helkajn vortojn, kiuj trafu en la korojn de niaj sileziaj esperantistoj. Karaj samideanoj! Mi en la lasta tempo ekrimarkis kun kordoloro, ke nia regiono ekĉesigis la laboron. Ni ekdormis kaj nun la vekigo ne estas ebla. Mi komprenas, ke ni sufiĉe multe suferis per forigo de kelkaj samideanoj, sed ni malgraŭ tio devus iri antaŭen. Ni ne povas haltigi la laboron. Kiel longe ni dormos ankoraŭ, miaj karaj? Estas jam tempo vekigi kaj denove

regule labori en niaj kluboj, el kiuj la pli granda parto estas senmova. Sub la ĉeha estraro sur nia regiono oni sufiĉe frukto-done laboris (precipe „Emo“ kaj „Estonteco“). Ĉu nun tio ne estas ebla? Kia malhel-pajo? Ni havos sufiĉe multe da viglaj esperantistoj, kiuj povas gvidi nin.

Por la unua fojo mi ne volas tre multe kritiki, supozante, ke niaj samideanoj ek-mencos la regulan laboron!

„Verda junulo“.

### INTERNACIA SEMAJNO NEDERLANDO.

La turista fako de la Nederlanda Esperanto Asocio „La Estonto Estas NIA“ aranĝas en ĉi tiu jaro denove 8-tagan restadon, kiu okazos de la 6a ĝis la 13a de aŭgusto en Amsterdam.

La programo enhavas interalie la jenajn vizitojn: Volendam kaj insulo Marken — la granda mardigo en la Zuiderzee — fromaĝ-foiro en Alkmaar — paco-palaco en 's-Gravenhage — banurbo Scheveningen.

Ĉiuj kostoj (hotelo — manĝoj — ekskursoj — trinkmonoj) estas Hfl. 55.—.

Petu la senpagan detalan programon ĉe la Vojaĝ-oficejo de L. E. E. N. v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33 Amsterdam Z. (Nederland).

★ ★ ★

### UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ uskutecznić można na konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr 29**, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABO-NANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1938, PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO. Nr 406.660. EKABONU POR J. 1939.**

**UZU LA ALDONITAN POŝTĈEKON!**

★ ★ ★

**ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO**

**11 rue de Sèvres, Paris (6<sup>o</sup>) (Francujo)**

poŝtĉekkonto: C. C. P. Paris 196-01

liveras ĉiujn esperantajn verkojn, ĉefe la Zamenhofajn.

★ ★ ★

**Uzu poŝtkartojn kun esper. teksto!**

Poŝtkarto — Monumento de Zamenhof 0'30 zł

— Tombo de Zamenhof 0'25 „

Poŝtkartoj ilustr. de Kraków; serio 0'80 „

por poŝtelspezoj aldonu 0'10 „

Poŝtkartoj — Zamenhofa naskodomo

en Białystok; lignogravuro

de Cz. Sadowski 5 pecoj

kun afranko 0'60 „

**Haveblaj ĉe „Pola Esper.“ Lubicz 34, Kraków. Konto PKO 406.660.**

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.— Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0'70, duobla zł 1'40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30.—, 1/4 paĝo zł 15.—, 1/8 paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0'70, podwójny zł 1'40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30.—, 1/4 strony zł 15.—, 1/8 strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.660.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.